Junio 1952 N-ro 416 Jarkolekto 49

# ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuiĝo. Esperantista (I.K.U.E.), fondita de Abbé Richardson en 1910 en Parizo.

Redakcio kaj Akministracio: Espero Katolika-VLEUTEN (Utrecht), Nederlando

Kunlaborantoj: d-ro E.J. Görlich (Aŭstrujo), Robert Ernst, sac. (Belgujo) Ludwig Thalmaier, sac. (Germanujo,) J. Vernoux, sac. (Francujo, Eusebio Maynar (Hispanujo), Prof, H.G. Wannemakers S.J. (Indonezio), G. Ellerman kaj d-ro W.J.A. Manders (Nederlando), d-ro W.Solzbacher (Usono).

## PENTEKOSTO 1952

*'Sed Kristo regnos, miaj katolikaj fratoj de Budapesto. Kaj se vi baldaŭ denove kunvenos por Eŭkaristia Kongreso, tiam ni donos al vi la spektaklon de unu granda Hispanujo, kiu estos digna trono por la Eterna Kristo'.*

Ĉi tiu korkrio skribis mons-ro José Pedro Gil Moreno de Mora el la karceroj de la persekutantoj en Hispanujo al la miloj da katolikoj, kiuj kunvenis en 1938 en la ĉefurbo de libera Hungarujo, por honorigi Kriston en la Sankta Eŭkaristio

En la tiama kongreso kardinalo Pacelli - nun Papo Pio XII - estis la papa legato. Inter la kongresantoj estis Joszef Mindszenty, nun kardinalo, nun en samaj cirkonstancoj, kiel tiam la hispana episkopo. Certe la hungaraj malliberigitoj same kunpreĝos, kiel tiam la hispanaj.

En ĉi tiuj tagoj la tuta katolika mondo estos unu en preĝoj por la paco. Ĝi estas la granda intenco. La sama intenco de la kongreso en 1934 en Buenos-Aires kie ankaŭ kardinalo Pacelli estis la papa legato kaj kie li parolis:

'La Eŭkaristio estas la fonto de la paco. Petu ni al Jesuo en Lia sakramento de amo ke Li donu al ni la veran pacon'. La sama penso regis en Budapesto.

Bona koincido ke la fino de la kongreso samtempe estas la festo de Pentekosto. La festo de la Sankta Spirito, la fonto de ĉiu amo.

En la arto eklezia ne estas permesate bildigi la S. Spiriton en persono. Ni nur konas la simbolojn de la kolombo kaj de la fajra lango. La kolombo kiu de ĉiuj tagoj estas la simbolo de la paco, la lango kiu estas la simbolo de la vorto kaj de la amo.

Bona koincido. La unua miraklo kiun faris la S. Spirito, estis miraklo de lingvoj. En Jeruzalemo la Disĉiploj parolis kaj ĉiuj ĉeestantoj el dekoj da landoj komprenis ilin. La uzado de Esperanto povus nenecesigi tian miraklon en la nunaj tempoj. En Budapesto okazis la unuan fojon dum Internacia Eŭkaristia Kongreso, ke Esperanto estis oficiale uzita. Ĝi estis sekceso

Ni esperas ke la dua fojo estos denove sukceso. Vidante la bonan presitan programon ni ne dubas pri tio.

En la venonta numero vi certe legos la raporton.

* * *

Junio 1952 N-ro 416 Jarkolekto 49

ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuiĝo. Esperantista (I.K.U.E.), fondita de Abbé Richardson en 1910 en Parizo.

Redakcio kaj Akministracio: Espero Katolika-VLEUTEN (Utrecht), Nederlando

Kunlaborantoj: d-ro E.J. Görlich (Aŭstrujo), Robert Ernst, sac. (Belgujo) Ludwig Thalmaier, sac. (Germanujo,) J. Vernoux, sac. (Francujo, Eusebio Maynar (Hispanujo), Prof, H.G. Wannemakers S.J. (Indonezio), G. Ellerman kaj d-ro W.J.A. Manders (Nederlando), d-ro W. Solzbacher (Usono).

## PENTEKOSTO 1952

*'Sed Kristo regnos, miaj katolikaj fratoj de Budapesto. Kaj se vi baldaŭ denove kunvenos por Eŭkaristia Kongreso, tiam ni donos al vi la spektaklon de unu granda Hispanujo, kiu estos digna trono por la Eterna Kristo'.*

Ĉi tiu korkrio skribis mons-ro José Pedro Gil Moreno de Mora el la karceroj de la persekutantoj en Hispanujo al la miloj da katolikoj, kiuj kunvenis en 1938 en la ĉefurbo de libera Hungarujo, por honorigi Kriston en la Sankta Eŭkaristio

En la tiama kongreso kardinalo Pacelli - nun Papo Pio XII - estis la papa legato. Inter la kongresantoj estis Joszef Mindszenty, nun kardinalo, nun en samaj cirkonstancoj, kiel tiam la hispana episkopo. Certe la hungaraj malliberigitoj same kunpreĝos, kiel tiam la hispanaj.

En ĉi tiuj tagoj la tuta katolika mondo estos unu en preĝoj por la paco. Ĝi estas la granda intenco. La sama intenco de la kongreso en 1934 en Buenos-Aires kie ankaŭ kardinalo Pacelli estis la papa legato kaj kie li parolis:

'La Eŭkaristio estas la fonto de la paco. Petu ni al Jesuo en Lia sakramento de amo ke Li donu al ni la veran pacon '. La sama penso regis en Budapesto.

Bona koincido ke la fino de la kongreso samtempe estas la festo de Pentekosto. La festo de la Sankta Spirito, la fonto de ĉiu amo.

En la arto eklezia ne estas permesate bildigi la S. Spiriton en persono. Ni nur konas la simbolojn de la kolombo kaj de la fajra lango. La kolombo kiu de ĉiuj tagoj estas la simbolo de la paco, la lango kiu estas la simbolo de la vorto kaj de la amo.

Bona koincido. La unua miraklo kiun faris la S. Spirito, estis miraklo de lingvoj. En Jeruzalemo la Disĉiploj parolis kaj ĉiuj ĉeestantoj el dekoj da landoj komprenis ilin. La uzado de Esperanto povus nenecesigi tian miraklon en la nunaj tempoj. En Budapesto okazis la unuan fojon dum Internacia Eŭkaristia Kongreso, ke Esperanto estis oficiale uzita. Ĝi estis sekceso

Ni esperas ke la dua fojo estos denove sukceso. Vidante la bonan presitan programon ni ne dubas pri tio.

En la venonta numero vi certe legos la raporton.

* * *

# OPINIO PRI APOSTOLADO

La moderna apostolado estas doktrine ellaboraĵo de la Papo kaj de la Episkoparo. Deklari nian opinion pri tio ne koncernas, nin, sed nur obei. Tamen estigas nepre tendencoj ĉirkaŭ iu opinio. Tiel tio ĉiam estis. Nu certe ekzistas en nia tempo tendenco, kiu proponas kiamaniere kiel ĉefan principon de la apostoleco la jenan formulon: 'Komence faru homojn, antaŭ ke vi faros kristanojn'. Ni pensas ke la kontraŭa formulo estus pli taŭga: 'Komence faru kristanojn. Ili estos konsekvence plie homoj'.
Kial? Tial ke tia pensmaniero estas tute konforma al Evangelio, t.e. al la Vero La jenaj vortoj de la Unika kaj Dia Majstro asertas kiel principon la fundamenton de la apostolado: 'Antaŭ ĉio serĉu la Regnon de Dio, kaj ceteraj venos ekstre al vi'. Aliparte tiuj paroloj rememorigas la fundamentan dogmon de la Kreo de la Homo, de lia Falo kaj de lia Savigo.
Kiam Dio kreis la homon, Li enblovis al li animon laŭ Sia imago. Kaj tiu Spirito estis senprokraste aligita al la supernatura stato. La Homo, kiun Dio intencis krei, - kaj kiun Li kreis-, estas supernaturigita homo. Alia homo ne ekzistas. Dio neniam pensis pri kreulo nure laŭ la natura stato. Nure kaŭze de sia Falo la Homo estis fortranĉita el la supernaturo. Ĉu oni povas vere aserti ke, en tia manko la Homo estas ankoraŭ la perfekta Homo?
Kiam Kristo venis por rekrei nin, Li plenumis nian restarigon donante al ni la Vivon de la Graco. Laŭ ni la Homo estas la Kristano, la Kristano estas la vera Homo. De nun Dio povas agi nure super nia malpliiĝita stato. Sendube estas necese, ke oni preparu la naturon ĉe la defalita kaj neankoraŭ kristana homo. La katehisma instruado plenumas tiun laboron. Sed ĉu oni povas diri, ke per tio oni estos restariginta la veran homon? Tute ne. Tia homo ankoraŭ sub la potenco de la Demono ne estas laŭ la Dia volo. Li ne estas tia, kian Li intencis krei lin (kun la supernaturaj donoj).
Tia opinio taŭgas, por ke oni evitu la naturalismajn doktrinojn, kiuj ja tro venenis la mondon. La Eklezio autaŭgardas nin kontraŭ tia danĝero, kiu ne estas iluzia. La tuta Tradicio depost la Apostoloj konigas al ni tian teknikon: 'Iru kaj instruu ĉiujn ĝis la ekstremaj randoj de la tero'.
Kion instrui? Laŭ S. Paŭlo 'Jesuon kaj krucumitan Jesuon'. Ĉiam temas kristanigi la homojn. Estu ĉiam zorgigantaj por doni la Kriston, taŭga kaj netaŭga tempe, ne embarasante vin per teknikoj de humanismo nepartoprenanta je la kristanismo.
Faru homojn! Ja! sed laŭ la modelo de Kristo. Jen, mi pensas, ĝi estas nia programo. Refaru la homojn kaj la teron pere de Kristo kaj en Kristo. Ĉar ni ne konas alian perfektan homon krom la kristanon, ne alian loĝeblan landon krom la Kristujon.

G. ALBY parohestro en Puicheric (Francujo)

# EŬROPO DEVAS ESTI UNU!

Ĉie en la Eŭropaj landoj oni konstatas viglan movadon por antaŭenpuŝi la Unuigon de Eŭropo. Oni eĉ notas datojn al kiuj oni celas por ke diversaj partoj de la plano estu realigitaj. Unu konferenco ankoraŭ ne finiĝas kaj jam alia komenciĝas.
Nur unu celo superregas la rapidecon de la agadoj: La Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo devas morgaŭ garantii la sekurecon de la personoj, la pacon inter la landoj, la socian justecon inter la klasoj.
Jen tri problemoj de la unua rango en Eŭropo. Estas ankoraŭ aliaj, ekz. kiel rekristanigi la junulojn, ktp. sed verŝajne la tri nomitaj nun estas plej urĝaj. Kaj ni katolikoj devas forte kunlabori en la solvo de tiuj problemoj, ĉar se la katolikismo ne solvos ilin, certe aliaj solvos ilin sen la katolikismo, eble eĉ sen la kristanismo. Kaj tiam nur estos tempospaco, kaj la nura solvo estos laŭ azia vidpunkto. Se la kristanoj ne solvos la problemojn, Eŭropo ne plu ekzistos.

Legante la ĵurnalojn, oni regule renkontas esprimojn pri 'Eŭropa unuigo', 'Plano Schumann' kaj mallongigojn kiel: E.O.F.S., E.B.U., M.S.S., kaj en nenia vortaro aŭ leksikono vi trovos ilian signifon.
Vi legas ke la ŝtatestroj konferencas en Parizo, Londono, Bonn, kaj ke en Strasbourg kunvenas ministroj kaj la 'Konsilo de Eŭropo'. Vi aŭdas pri la integraleco de Eŭropo, pri Eŭropa armeo, pri la 'Verda Plano'. Kaj eble vi dubas pri la neceso de tiuj klopodoj kaj aranĝoj, kaj se vi ne dubas pri la neceso, vi eble malesperas je la efiko.
Fakto estas ke nuntempe en Eŭropo oni preparas decidojn, kies aranĝoj ne estas facilaj. Oni penas al la unuigo de Eŭropo sur la terenoj politika, ekonomia, financa, milita, ĉar la nuntempa disigo de niaj landoj estas baro kaj eĉ minaco por la estonteco.
En ĉi tiuj tagoj la unuigo sur la milita tereno superregas la aliaj, ĉar depost februaro 1948 klare montriĝas la neceso ke ĉiuj liberaj ŝtatoj de Eŭropo, eĉ de la tuta mondo, devas unuiĝi por kontraŭstari reĝimo, kiu el aziaj re gionoj ruliĝas ĉiam malproksime, reĝimo kiu jam englutis diversajn memstarajn kaj forte kuraĝajn landojn. Reĝimo kiu ne respektas la homan dignecon, kaj la personan sekurecon.
Nenia lando en Eŭropo, kiagranda ĝi estu, nun ne kapablas en la kadro de siaj landlimoj organizi la kondiciojn, kiuj estas necesaj por la socia kaj ekonomia profito kaj bonstato de la enloĝantaro. Artefikaj limoj, diferencoj en la provizoj, nesamvaloraj moneroj malhelpas la bonstaton, al kiu ĉiu rajtas.

## ANTAŬE kaj NUN


Eŭropo evoluiĝis kiel natura, historia unuiĝo, en kiu regas la greka kulturo kaj la roma genio, kiuj ambaŭ ebligis tion, kio estas la vera vizaĝo de Eŭropo: la kristanismo.
La reformo finis la religian unuecon kaj jam disigis diversajn naciojn.
La kulturita naciismo, tiel majstre aŭ ĉu ni devas diri tiel diable evokita de i.a. kardinalo Richelieu, forrompis la lastajn restojn de la unuiĝo.
Ĝis en la 18a kaj 19a jarcento Eŭropo estis la gvidanto de la mondo pro sia povo kaj riĉo. Tamen kiam la 20a jarcento alproksimiĝas Azio vekiĝas, La Sud-Amerikaj ŝtatoj fariĝas sendependaj, kaj Usono disvolvas sian materian forton
Du mondmilitoj ruinigis Eŭropon, same politike kiel ekonomie. Okupacio kaj ruinigoj malfortigis la agrikulturadon kaj la industrion. Socia malkontento kaj minaco de la vivnivelo en ĉiuj landoj estas ĉiutagaj riskoj.

## La nura solvo estas: UNUIGO

La loĝantaro de Okcidenta Eŭropo (260 milionoj) estas preskaŭ la duoblo de Usono (146 milionoj). La fontoj de Eŭropo kun tiuj de la transmaraj regionoj estas grandegaj. Pro la spiritaj kaj teknikaj povoj de sia loĝantaro Eŭropo povas samrajte kundecidi en la mondo. Tamen tiam necesas unueco!
Eŭropo devas esti unu granda konsumregiono sen doganlimoj, ktp. Sed por akiri, tion, necesas ke ekzistu unu politika aŭtoritato, kiu povas respektigi siajn decidojn.

## MODERNA PSIKOLOGIO!

Iun tagon knabineto devis submeti sin al serio da testoj por ekkoni sian inteligenta-kvocienton.
'Nu', komenciĝis la psikologo, 'ĉu vi estas knabeto aŭ knabineto?'
'Knabeto', la knabineto respondis.
'Bone', diris la miranta fakulo. 'Tio estas interesa. Kaj kio vi fariĝos, kiam vi estos granda?' 'Patro', la ĉarmulineto diris.
'Sed karulino', interrompis ŝia patrino, ' vi scias ja pli bone! Kial vi diras tiajn malsaĝajn aferojn'.
'Ĉar', la infano gravmiene respondis, 'se li faras tiajn stultajn demandojn, mi devos doni stultajn respondojn por ke li trovu min inteligentan.'



# LA EKLEZIO

Ĉina sacerdoto devis priskribi sian karieron. Tio estas normala afero en kelkaj landoj, kie la policanoj ne estas sufiĉe kapablaj mem esplori tion. Li komencis per la naskiĝo de Kristo kaj la fondo de la Eklezio. Li skribis pri la sacerdotiĝo kaj pri la romaj persekutoj, ktp. 'Se vi tiel ŝatas la persekuton, ni helpos al vi', estis la rimarko de la malliberejа oficiro. Kun katenoj ĉirkaŭ la piedoj, li devis denove pripensi sian vivon; li devis verki sian raporton denove.
La rezultato ne kontentigis la direkcion. Oni katenis al li la manojn. Baldaŭ sekvis dua kateno.
Ĉi tiu katenita pastro estas simbolo de la eklezio en Ĉinujo kaj en aliaj popoldemokrataj landoj. La katenoj sin sekvas, sed la kaptito fariĝas heroo.

**PARADO**

1 Oktobro 1951. Multe da povo, multe da belo en tuta ĉinujo, sed speciale en la ĉefurbo Peking. Religiaj unuiĝoj, sacerdotoj, fratinoj kun siaj lernantoj flankitaj de ruĝaj flagoj, kantantaj la novajn kantojn, salutantaj la novajn registojn, malfermis la procesion . . . . . Bedaŭrinde, sed vere ili estis la unuaj. Post ili venis la nacia katolika eklezio, sekvata de la protestantoj, la budaj kaj la taoaj pastroj en plena ornato.
Kiel klarigi ke la katolikoj estis la unuaj? Unue la ruĝaj registoj estas en Peking iomete pli mildaj ol en aliaj regionoj. Ili volas pruvi al la eksterlandaj diplomatoj, ke 'la religia libereco', garantiita de la konstitucio, vere ekzistas. Tamen tiuj diplomatoj ne havas la permeson forlasi la ĉefurbon. Due oni devas pripensi jenon: Ĉu la katolikoj, kiuj partoprenas tiajn solenaĵojn estas defalitaj de sia religio? Certe ne! Estas ekzemplo de speciala komunista propagandtekniko: miksi la naciajn aferojn, kiuj en si mem estas bonaj, kaj la religiaj aferoj. Se la katolikoj rifuzas la partoprenon, tio estas certa pruvo de malamo al la patrujo; se ili partoprenas, ili donas ŝajnon, ke ili eksiĝis kiel katolikoj. Kion fari?

**FOR de ROMO**

Iom post iom la premo sur la katolikoj por aliĝi al la nacia katolika eklezio fariĝas pli forta. Sub la devizo: Oni devas ami la patrujon; tio signifas, defendi ĝin kontraŭ la imperialismo; la eksterlandaj misiistoj, la episkopoj, la papa nuncio estas imperialistoj; do ni devas liberigi la patrujon el ilia povo. La papo estas la supra-imperialisto; do ne plu interrilatu kun li. Ĉi tiu propagando estas gvidata de la registaro. Ĝi okazas laŭ la samaj direktivoj en la nordo kaj la sudo, en la oriento kaj la okcidento. Kaj tio en lando kiu estas same granda kiel tuta Eŭropo!

**PAROĤAJ KOMITATOJ**

En ĉiu paroĥo la estrado devas esti ĉe komitato, kiu laboras laŭ la sistemo de la plejmulto. Tri kvaronoj de la komitato estas laikoj. Per deviga premo la komitato estis formata, ĉar nek sacerdotoj, nek laikoj akceptis libervole ĉu elektita, ĉu nomigita la taskon. La komitato devas doni la permeson por ĉio, por la s.meso, por prediko, por ĉeesto kaj ricevo de la sakramentoj, ktp. Ĉu ĉiu pastro, pri kiu oni legas ke li kunlaboras en la nacia eklezio, estas herezanto?

# IN KATENOJ

Ne pre ne! Ĉar ofte oni nur publikigas lian nomon por la propagando. Tio certe kaŭzas sufiĉe da malprofito al la kredantoj. Kaj kio okazas, se tiuj pastroj protestas?

**HEROAJ PASTROJ**

Jen ni tuŝas alian ĉapitron. 'La sango de la martiroj estas la semo de la Kristaroj'. Pri protestantaj pastroj oni nenion plu aŭdas. Aliaj pastroj estas false imputataj de diversaj, ofte naŭzaj krimoj. Ekz. murdo je infanoj, speciale je orfoj; perfortigo de virinoj; speciale de monaĥinoj; perfido de la patrujo; spionado por Usono; ktp., ktp. Kaj se la viktimoj senkulpaj ne volas rekoni sian ŝuldon, ili estas submetataj al turmentegoj, pri kiuj nia plumo rifuzas doni raporton. Ili eĉ superas la plej mallumajn tagojn dum la lasta mondmilito. Kaj kiu scivolas pri tiaj faroj, li legu unu el la lastaj numeroj de Colliers (Usona Revuo) en kiu kardinalo Spellman sufiĉe detale skribas pri la aferoj. Eĉ kiel estas eble ke post tiaj turmentoj, senkonscie kelkaj pastroj subskribas fidokumentojn, aŭ kiel ili tute frenezaj faras memmurdon. Nur unu ĉifro: en 1948 estis en Ĉinujo 28.000 pastroj, ĉinaj kaj fremdaj, katolikaj kaj protestantaj. Nun ankoraŭ estas 1800 en tiu grandega mizera lando.

* * *

Fine ni donu koncizan raporton pri la jaro 1951a.

**Januaro.** Aranĝoj kontraŭ la posedoj de eksterlandaj misiistoj: depago de t.n. antaŭaj impostoj, senaktivigo de mono kaj valorpaperoj, konfiskado.
Multe da misiistoj en la kamparo ricevas domareston. Kontakto kun la paroĥanoj estas malpermesata. Personaj posedaĵoj sigelataj, Flanke de la polico ili ricevas unufoje en la monato la nuran neceson por resti vivanta.
**Februaro.** La atakoj kontraŭ la institutoj de karito de la misio atingas kulminon. Subite akuzoj estas formataj kontraŭ la fratinoj kiuj direktas orfdomojn kaj hospitalojn; ili mortigus infanojn sub la masko de la krista karito.
**Marto.** Akraj akuzoj de la preso al la papa internuncio mons-ro Riberi pro ties averta letero kontraŭ la 'For de Romo Movado'.
**Aprilo.** Neniaj novaj formoj de persekuto, Nur la malnovaj daŭras intense.
**Majo.** Ekzilo de mons-ro J. de Vienne c.m., episkopo de Tientsin pro lia rezisto al la 'For de Romo Movado', kaj ĉar li starigis la Maria-legionon.
**Junio.** Konfiskado de la Centra Oficejo por Kunlaboro inter la Katolikaj Misiistoj.
Mons-ro Riberi ne povas forlasi sian domon.
**Julio.** En Tientsin ĉiuj membroj de la Maria-legiono estas deklarataj ekster la leĝoj.
En la nokto de la 25a de Julio la polico sigelas en Peking 2/3 de ĉiuj katolikaj preĝejoj kaj ĉinaj kaj fremdaj pastroj estas kondukataj en la malliberejon.
Nur kaŝe kelkaj pastroj povas rilati kun la kredantoj. Publikaj tribunaloj kondamnas la pastrojn.
**Aŭgusto.** Ankaŭ en Shanghai, Nanking kaj en aliaj urboj la Maria-legiono estas malpermesata kiel kontraŭŝtata.
**Septembro.** La papa internuncio kaj diversaj episkopoj devas iri en ekzilon.
**Oktobro.** Akraj agadoj en la urboj kontraŭ la rezistaj membroj de la Maria-legiono.
**Entute** oni scias ke: la papa internuncio kun 9 episkopoj estis ekzilitaj. Deknaŭ ĉinaj kaj fremdaj episkopoj estis en la malliberejo.
Kvin aliaj havas domareston.
Pli ol 300 ĉinaj kaj fremdaj pastroj en malliberejoj sub tre mizeraj cirkonstancoj. Ĉirkaŭ 1000 pastroj, fratoj, kaj fratinoj devas forlasi la landon kun nenio ol siaj mizeraj vestoj.

Preĝu ni por ke la bona Dio helpu per Sia graco la aliajn, kaj ke Li kompatu la popolon.

# M A L S A N G R O

Tiun matenon estis sonorinta kvarono de la kvina, kaj la stalisto ankoraŭ ne estis malferminta la pordojn de l'ĉevalejo. Sonoris la duono .... ankoraŭ ne.
-Eble li endormiĝis, fripono ... -grumblis kun furiozo la ĉaristoj.
-Diabla maljunulo! -diris unu. - Ĉu vi ne volas malfermi, je cent demandoj?
-Malsangro! -kriis alia, frapante al la pordoj per ŝtono.-Malfermu, fulmon de Dio! Sed Malsangro ne respondis vorton, nek donis signojn de vivo.
Tiam unu el la junuloj grimpis tra la fenestro de l'pajlejo kaj post unu salto troviĝis en la ĉevalejo. Post momento malfermiĝis larĝe la pordoj de la stalo kaj eliris la junulo, kriante terurite:
-Malsangro estas mortinta!
-Mortinta?
-Jes, mortinta... Ĉevalo hufobatis lin.
Ĉiuj, ĉaristoj enrapidis internen, kaj tie, en angulo, sub erpilo, ili vidis Malsangron, sternitan sur la sterko, malvarman, glacian, malpuran de pajleroj kaj makulitan de koagulita sango.. Iom malproksime kuŝis ĉevalo kun la ligoŝnuro pendanta ĝis sur la planko...
Ĉiu vidis tuj, kio okazis tie la nokton. Ĉevalo malligiĝis... la stalisto volis religi ĝin... sed la besto piedbaraktis... per la unua frapo senkonsciigis lin, kaj poste, kvazaŭ ne sata, hufbatis ĝis lin senanimigis.
Ĉiuj ĉaristoj rigardadis la kadavron, enpensaj kaj teruritaj
Fine, unu rompis la funebran silenton.
-Vi scias kion mi diras? Ke... li ne povis mortiĝi alimaniere,la malbonulo...
-Fide al Dio, ja ne! - respondis alia.
-Ne multe, ke li, kiu mortigis la bestojn per turmentoj, mortis sub la hufoj de ĉevalo.
-Estas kvazaŭ revenĝe...
-Malbona fino...
-Nomu ĝin puno de l'infero...
Kaj tra la memoro de tiuj viroj pasadis rememoroj pri la teruraj martirsuferoj, kiujn la stalisto travivigis de la bestoj, kiel ekzekutisto sin amuzanta per la doloroj de l' viktimoj. Ja tiuj viroj estis se necese batemaj kaj eĉ sovaĝaj kaj senanimaj... sed, ne tiom, fulmo!... tiaj ne! kiel tiu sovaĝulo senkompata...
Pro bagatelo, jen vi havis lin, kun la vipo en la aero... kvazaŭ pikita de vespo, kaj blasfemanta kiel malbona spirito. Kaj jen prenis ĉevalon kaj frapis sur ĝian nazon ĝis rompi al ĝi la krurojn. Aliajn fojojn li torturis ilin trankvile, kun malvarma sango, per krueleco de pacienca homo.
-Mi, - diris unu el la rondo, - foje vidis lin, kiam li metis al ĉevalino stangon en la orelon, pikante kaj suferigante ŝin...
-Mi, -diris alia - unu tagon kaptis lin, dum li plenigas per sablo la okulojn al unu ĉevalo!
-Nu, do ...forte!
-Nu, do ...ke li kondamniĝu pro malbona animo!
-Li ne povis finiĝi alimaniere...
Sed tiam eliris el la rondo maljunulo kaj kun kompata mieno diris:
-Knaboj... eble vi ne dirus, kion vi diradas, se vi scius la historion pri tiu viro. Eble, vi eĉ havus por li kompaton, se vi konus la malfeliĉojn, kiuj sur li pasis. Mi konis lin junan, bubon preskaŭ... Li ĵus eliris el la Sankta Domo... ĉar, malfeliĉa, li estis bastardo, estis senpatrulo...Li kreskis maldika, malsanema... kaj estante tiel obeema, tiel bona, ĉe l' najbararo de Poblet li kompatigis ĉiun.... Pro kompato oni instruis lin gvidi ĉaron,tiam dum la konstruoj ĉe Bogatell. La knabo refariĝis... revekiĝis... fariĝis matura viro... Post kelkaj jaroj, li eĉ enamiĝis de knabino el la 'Camp de l' Arpa ' kaj edziĝis kun ŝi. Tiu viro ne deziris pli grandan feliĉecon kaj opiniis sin pli feliĉa, ol reĝo... Kiam li vidis sian edzinon gravedan,li ne eltenis sian ĝojon. Mi memoras tion, kiel hieraŭan okazon... Tiam ni laboris ĉe la remparoj de Sankta Petro, kiujn oni disfaligas. Ŝi, plengraveda, venis ĉiun tagmezon porti al li manĝon. Ili ambaŭ sidiĝis ĉe ombro de arbo, apud la ĉaro, kaj rigardadis sin mirefiksitaj, kvazaŭ neniam estus sin vidintaj.Sed...jen unu tagmezon, kiam plej senzorge ili rigardadis unu la alian, la ĉevalo kiun li mastras, pikita de muŝoj aŭ ial ajn, levas la krurojn kaj svinge hufofrapas la virinon sur la mezo de l'ventro... La virino falas sternite,sen signoj de vivo... Ni ĉiuj alkuras, metas ŝin sur portilon kaj portas kurante hejmen...
-Kaj... ŝi mortis?- demandis la ĉaristoj.

-Mortis. Mortis ŝi...mortis la ido, kiun ŝi portas en la interno... kaj de tiam, ŝia edzo ŝajnis freneza... kaj rigardis ĉevalon, kvazaŭ li vidas la malbonan spiriton. Ĉiuj ĉaristoj restis enpensiĝe, rigardadante la kadavron de la stalisto.

Ramon Casellas - trad. Josep Grau Casa L.K.
El: Kataluna Antologio.

## U.E.A. DECIDIS PRI LA UNIVERSALA KONGRESO 1953

Jam antaŭ unu jaro oni diris ke verŝajne la kongreso en 1953 estos en Zagreb (Jugoslavujo). Tamen en la aŭtuno de 1951 en Amsterdamo formiĝis komitato,kiu kolektis garantisumon por ke la Universala Kongreso en 1953 okazu en la ĉefurbo de Nederlando. Laŭ la decido dum la katolika kongreso en München, ni kongresos ĉiunduan jaron, se ne aliaj cirkonstancoj ebligas devii de tiu vojo. Ni jam antaŭvidis tre sukcesplenan katolikan kongreson en Amsterdamo en 1953. Tamen dum la Paskaj Tagoj, kiam la estraro de UEA kunvenis en la centra oficejo en Rickmansworth ĝi decidis ke la U.K. en 1953 estos en Zagreb.
Ni ege bedaŭras tiun decidon. Al tre multaj personoj ĝi malhelpos ĉeesti la kongreson. La katolikoj ne povas kongresi en urbo kies ĉefepiskopo, mons -ro Stepinac jam dum jaroj estas kaptito de la jugoslava komunista reĝimo.
Ni ne povas kongresi en lando, kie episkopoj kaj pastroj estas fitraktaj publike, kondamnataj al punlaboro. El diversaj faktoroj rilate Jugoslavujon en la mondpolitiko (kaj ĉu ankaŭ la UEA-estraro estas submetata al tia influo?) oni povas konkludi ke oni ne kontraŭstaras la komunismon, la perfidan sistemon, kiu ruinigas la personan memstarecon ,sed ke oni nur timas la imperialisman komunismon de Moskvo.
Se la Franca Ligo akceptas la organizon, kaj se la IKUE-estraro konsentas, Nederlanda Katoliko proponis kongresi en Lourdes aŭ ties ĉirkaŭaĵo, ĉar en 1953 ni esperas festi la 50-jaran ekziston de 'Espero Katolika', kies fondinto, pastro Emile Peltier, estas entombigita en Lourdes.
Ni esperas baldaŭ doni decidajn komunikojn.

La sekretario.

## FAKTOJ EL LA MOVADO!

La Hispana Esperanto Kongreso okazos de 26-29 julio venonta en Valencia. Oni organizas Literaturan Konkurson. Manuskriptoj devas esti antaŭ la 15 a de junio ĉe: 13a Hispana Esperanto Kongreso, Pelayo 7, I, Valencia.

* * *

La 1952-a eldono de la enciklopedia verko 'The New International Year Book' (La Nova Internacia Jar-libro', publikigita de la firmo Funk & Wagnalls,New-York, enhavas detalan artikolon pri Esperanto verkita de nia ĉefestrarano d-ro W. Solzbacher, kiu samtempe estas prezidanto de EANA. La artikolo estis represita en la oficiala Parlamenta Protokolo de Usono, laŭ iniciato de Kongresano Karl Stefan. La 42a kongreso de Esperanto en Nord-Ameriko okazos de 27-30 junio venonta en Sacramento, ĉefurbo de la ŝtato Kalifornio.

* * *

La Sveda Esperanto Asocio havas sian propran turistan servon, Jam oni karavane vizitis Nederlandon dum la florantaj bulbkampoj kaj oni planas vojaĝon al Hispanujo, Francujo kaj Novegujo. Oni nur uzas la Esperantan lingvon.

* * *

La Marta numero de 'The Linguist' enhavas bonan artikolon de s-ro M.C. Butler, en kiu li respondas al kritikoj pri Esperanto. Tiu revuo daŭrigas la serion de 'Tipaj Konversacioj' en Esperanto kaj en kvin aliaj lingvoj.

* * *


La estraro de Skolta Esperantista Ligo reorganizis la Ligon. Nun ekzistas en 16 landoj agentoj, kiuj klopodas enkonduki nian lingvon en skoltajn rondojn. Oni mirus se en tia internacia sfero oni ne havus rezulton.

* * *

La Internacia Foiro en Padova (Italujo) okazos de 7-22 juniovenonta. Ĝi propagandcele eldonis reklamilon kiu mezuras 70x100 cm. en Esperanto.La oficejo korespondas kaj informas en nia lingvo.

* * *

De 17-27 aŭgusto venonta okazos internacian konferencon por esperantistaj studentoj kaj altlernejanoj kaj altlernejanoj en Schluchsee,(Sud-Germanujo). Ĝi estas organizata de Esperanto-Federacio de Danaj Altlernejanoj. Informojn donas IKESA 1952,Laksegade 35,Kopenhago * * *



# RADIO PROGRAMO

Junio 4: Turismo; la Kastelo de Graines en Valo de Aosta (Blasimme)
Junio 6: Grava fonetika eksperimento, al kiu oni petas multenombran partoprenon. (Laŭ iniciato de Scienca Revuo)
Junio 11: Italaj komponistoj: Antonio Stradivara (Blasimme)
Junio 13: La Kristaneco: La civila misio de la kristana Romo (Musella)
Junio 18: Rekonstruado de Kalabrio. (Minnaja)
Junio 20: Itala Literaturo: Chanson de Roland. (Musella)
Junio 25: Porla knaboj 'Pinokjo'. 6a sceno.
Junio 27: La Kristaneco: S-ta Paŭlo. (Musella)
Horoj: 19.00 - 19.20 (MET). Ondolongoj 25,21 m - 31.35 m - 49.92 m.
Bonvolu raporti al RADIO ROMA - Esperanto Fako - Via Veneto 56 - Roma(Italujo).

RADIO BERN dissendas marde je 12.55 kaj 18.35 h. la prelegojn de d-ro Baur, kaj ĵaŭde je la samaj horoj la prelegojn de d-ro Privat. Ondolongoj: 48,66 m, 31.46 m, 13.94 m. Bonvolu raporti al S.R.G., Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern (Svisujo).

RADIO MADRID merkrede de 19.30-20.00 h. Ondolongoj 233 m kaj 42.33 m. Raportoj al: Radio S.E.U., Seccion Esperanto, Diego de Leon 49, Madrid (Hispanujo).

Ne forgesu aŭskulti sabatvespere je la 23.15 h. al Radio Hilversum 402 m. Katolikaj informoj! Nepre raportu al K.R.O. - Hilversum (Nederlando).

---




13, Frato Arnoldo, Oranjestad, (Aruba) Ned. Antiloj.

Niaj persekutataj samkredanoj atendas vian helpon! Bonvolu sendi vian kontribuon por ĉi tiu kategorio.

---



# KORESPONDADO

Se vi tiom ŝatas la internacian kontakton, kial via adreso ne estas ĉi tie? Tio kostas nur 1 Int. respondkuponon!

---

Ĉu vi jam mendis: 'SPIRITAJ EKZERCADOJ' de Ignacio de Loyola
La traduko ricevis la 'Nihil obstat' kaj Imprimatur'.
'La gratulo (al la tradukinto) estu akompanata de la deziro ke tiu ĉi libro trovu vastan interesularon.' (El la recenzo de 'Esperanto Internacia' de U.E.A.)
Havebla ĉe nia Libroservo kaj reprezentantoj. Prezo ƒ 0.85 aŭ 5 Int. Rkp.

---

Kantoordrukkerij "Elinkwijk" Amsterd. Straatweg 480 - 482 Utrecht - Tel.10757